Theodor Storm,

# Epilogo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Elpensis mi ĝin por konsolo
En tiu tempo de mizer',
En ĉi flortempo de kanajloj,
En tiu temp' de malliber'.

Ne malesperas mi, la mondo
Ja devas ĝoje renoviĝi;
La vera ĝermo de la vivo
Senfrukte povas ne perdiĝi.

La sono de printemp-tempestoj,
Dumnokte timiginta nin,
aŭdebla en arb-susurado,
revenos foje je la fin'!

Kaj tiu lasta tondrobato
Postsonos tute tra l' ĉiel',[2]
Kaj tiam vere printempiĝos
Kaj iĝos luma tagohel'.

Kaj vivu la estontaj homoj!
Kaj la poeto, vivu li,
Levanta el la min' de l' vivo
La gemon de la poezi'!

*Traduko de la Germana poemo "Ein Epilog" de* Theodor Storm *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2002-04-03.*

*MR-379-1b / Arg-184-371 (2004-02-24 08:20:58)*

*La poemo estu kvazaŭ epilogo pri la malsukcesinta germana revolucio de 1848.*

Theodor Storm,

# Ein Epilog

Ich hab es mir zum Trost ersonnen
In dieser schweren Zeit der Not,
In dieser Blütezeit der Schufte,
In dieser Zeit von Salz und Brot.

Ich zage nicht, es muss sich wenden,
Und heiter wird die Welt erstehn,
Es kann der echte Keim des Lebens
Nicht ohne Frucht verlorengehn.

Der Klang von Frühlingsungewittern,
Von dem wir schaudernd sind erwacht,
Von dem noch alle Wipfel rauschen,
Er kommt noch einmal über Nacht!

Und durch den ganzen Himmel rollen
Wird dieser letzte Donnerschlag;
Dann wird es wirklich Frühling werden
Und hoher, heller, lichter Tag.

Heil allen Menschen, die es hören!
Und Heil dem Dichter, der dann lebt
Und aus dem offnen Schacht des Lebens
Den Edelstein der Dichtung hebt!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Theodor Storm *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04).*

*Arg-184-370 (2004-02-24 08:25:07)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poemon en la libro „Theodor Storm“ de Regina Fasold, el la serio Bild-Biographie, eldonita de la eldonejo VEB Bibliographisches Institut Leipzig, en 1990, ISBN 3-323-00196-6.*

[2] aŭ eble: Postsonos tuta tra l' ĉiel',